

Krom saĝo kaj ekvilibro mensa,
ankaŭ ekstrema toleremo estas
necesa por esti feliĉa.

Tibor SEKELJ

BAZARO

Esperantlingva revuo, Cluj-Napoca, Jaro II, Numero 3 (6)
1998, Aŭtuno



ISSN 1453-7478

ABONO !

La abono por la sekvanta numero de BAZARO por Rumanianoj estas 2.500 leoj aŭ egalvaloro en poŝtmarkoj kaj por eksterlandanoj 1 IRK.

La abonon bonvolu sendi al jenaj adresoj:

C.P.1111. RO-3400 CLUJ-NAPOCA por KOLOZSVÁRI Zsolt aŭ

C.P.200. RO-3400 CLUJ-NAPOCA SIGMOND Júlia

Ni akceptos donacojn, subtenojn kaj varbas distribuantojn por nia gazeto!

Dankon, La red.

Ni dankas al niaj subtenantoj, kiuj laŭ siaj eblecoj helpis nin:

s-ro Bernhard EICHKORN, GERMANIO, 20DM;

s-ro Ciprian JAUCA, KANADO, 200FRF;

s-ro Hermann J. HORRIX, GERMANIO, 10DM;

s-ino Margarethe BETTMANN, GERMANIO, 100DM kaj 120FRF;

s-ro Ionel ONET, USONO, 4000FTL;

s-ro Mihai TRIFOL, RUMANIO, 15 Esperanto-lerolibroj;

MUNICIPA KULTURDOMO, ĉar ebligis al ni redakti la 6-an numeron de BAZARO.

DANKESPRIMO

La Redakcio de BAZARO elkore dankas al Hungaria Esperanto-Asocio pro la donace ricevitaj 77 libroj (28 titoloj). Dank' al ĉi-tiu grandanima donaco, ni iniciatas la Pruntlibraron por geesperantistoj el Rumanio. Samtempe ni petas ĉiujn legantojn, se iu havas duoblan numeron el iu E-literaturajo, bonvolu sendi al nia libraro.

La redakcio ne respondecas pro la artikoloj skribitaj de niaj kunlaborantoj, kaj ili ne nepre reflektas la opinion de la redakcio. Ni ne resendadas la manuskriptojn, nur se vi nepre petas tion!

Redakcio:

ASOCIO de ESPERANTO CLUJ
RO-3400 Cluj-Napoca, C.P. 1111
RUMANIO

Eldonas:

Eldonejo DOKIA
P.O. Box 1-452, RO-3400 Cluj-Napoca,
RUMANIO kaj
MUNICIPA KULTURDOMO
P-ta Unirii n-ro 24
RO-3400, Cluj-Napoca, RUMANIO

Redakcia komitato:

Radu CRETU, SIGMOND Júlia,
KOLOZSVÁRI Zsolt

Aperas: kvaronjare

Redactia:

ASOCIATIA de ESPERANTO CLUJ
RO-3400 Cluj-Napoca, C.P. 1111
ROMÂNIA

Editata de:

Editura DOKIA
P.O. Box 1-452, RO-3400 Cluj-Napoca,
ROMÂNIA si
CASA MUNICIPALA de CULTURA
P-ta Unirii nr. 24
RO-3400, Cluj-Napoca, ROMÂNIA

Comisia de redactie:

Radu CRETU, SIGMOND Júlia,
KOLOZSVÁRI Zsolt

Apare: trimestrial.

PRI LA 83-a UNIVERSALA KONGRESO

Nur la malfacile elteneble varmego ne plaĉis al mi en Montpeliero dum la U.K. La ĉiama problemo de la program-abundeco kelkfoje kaŭzis sinceran bedaŭron, ĉar samtempe okazis du aŭ eĉ tri interesaj programoj. Ŝerce mi diris, oni devus eltrovi la "klonadon" de la gekongresanoj ja ne nur mi plendis pro la troa riĉeco de la U.K.

La solena malfermo estis tre ĝojiga, ĉar mi renkontiĝis jam en la unua tago kun pli ol 10 malnovaj geamikoj.

Mi partoprenis kelkajn prelegojn de la Internacia Kongresa Universitato. Pleje plaĉis al mi: "Shakespeare interlingvisto" (preleganto: Humphrey TONKIN) kaj "Interkultura komunikado" (prelegantino: KOUTNY Ilona).

La ĉi-jara Kongresa temo: "Mediterraneo - ponto inter kulturoj" - havis same interesajn prelegojn.

La Ekumena Diservo en la Sankta Francisko preĝejo altiris multajn kristanojn, kiuj sopiris kune preĝi kaj kanti en Esperanto.

Interesa estis la "Interreligia konferenco", la "Forumo de la Esperanto-komunumo", la IKEL (etnistoj) jarkunveno, la prezentado de la nova Akademio de Esperanto kaj de la Nova Estraro de la UEA.

Aparte mi devas mencii la renkontiĝon de la "Movado Sen Nomo", kie Ivo Durwaell parolis pri ĉi tiu plej modesta, tamen tre valora movado Esperanta.

El la artaj programoj mi sukcesis rigardi la spektaklon "Meluzina la Granda Feino". Ravegis min la belega teksto, sed bedaŭrinde la spektaklo estis tro longa, pro tio iomete laciga. Bedaŭrinde nur malmultaj homoj ĉeestis en la angulo de la Libro Servo-Salono, por aŭskulti la recitalon de unika kaj neimitebla Mikaelo Bronŝtejn. La adiaŭa koncerto ĉi-jare ne estis sufiĉe internacia vespero. (Aŭ ĉu mi estis jam tro laca??!)

Renkontiĝis ankaŭ ĉi-okaze la goo-ludantoj, kie ankaŭ mi aŭdacis ludi. Bedaŭrinde nur viroj ludis (ĉefe japanoj), do mia norvega partnero gajnis.

Eble la plej distriga programo estis la Aŭkcio. Ĝia gvidanto Osmo BULLER kun alia helpanto, lerte kaj kun bonhumoro provis kiel eble plej grandan sumon havigi de la monhavantaj esperantistoj, kiuj volis akiri la diversajn, tre valorajn librojn, fotojn, rarajojn, samtempe volis helpi UEA-n.

La jam menciita abundeco malhelpis min partopreni la tre atendatan programeron, kies nomo estas "Komuna Silento". Mi tre bedaŭris, ja mi jam spertis ties efekton antaŭ du jaroj en Prago.

Ĉi jaron UK-n partoprenis el 66 landoj 3133 geesperantistoj. Unu el la feliĉaj partoprenantoj estis mi,

'SIGMOND Júlia CLUJ-NAPOCA

La 83-a UK de Esperanto estis impona, ne nur per la multnombra partopreno (3133 geesperantistoj el 66 landoj) sed ankaŭ per la Kongresejo Le CORUM, ankaŭ per la tre riĉa kaj varia programo ankaŭ per sia tempodaŭro (unu semajno) ankaŭ per la plej inda kvalito: la uzo de la sama lingvo kiel interkomunika rimedo inter la diversaj kulturoj kaj popoloj, inter miloj da homoj apartenantaj de ĉiuj kontinentoj. Ankoraŭfoje ESPERANTO montris sian trajton de universala lingvo.

La kongresa etoso kiu daŭris intense dum la tuta semajno, kreis favorajn kondiĉojn por fortiĝi la malnovaj amikecoj kaj kreiĝi novaj, por establi kunlaborkontaktojn trans la limoj kaj jaroj. Ĝi, la varma etoso, etendiĝis kiel dolĉa vento en la bela Montpeliero, en la Suda Francio kaj daŭre ĉirkaŭante la planedon, ĉar ĉiu partopreninto de la Granda Kongreso irante hejmen kunportis ĝin en sia valizo, en sia cerbo kaj en sia koro. Nun, kiel mi, tiel vi, ĝi daŭras igi nin labori por la samaj komunaj nobelaj celoj: por paco, amikeco kaj kunlaborado pere de Esperanto. Eĉ se niaj streboj estas nur gutoj en oceano, ni ne devas forgesi, ke la Granda Oceano estas formita el la malgrandaj gutoj, do ĉiu aĵo havas sian rolon en la senlima Kosmo. Nu, ni ludu konscie nian rolon! Per nia saĝa kaj perseverema laboro ni povas influi pozitive la estontajn eventojn, alivorte: ni, la esperantistoj kreas nian propran destinton per niaj faradoj kaj se la E-movado ekzistos aŭ ne, se ĝi maturiĝos kaj disvolviĝos aŭ ne, tio dependas nur de ni mem. Se ĉiuj en la loko en kiu ili vivas agos konscie kaj pasie laŭ rekomendoj de la altaj spiritoj kaj je la bono de la homaro, certe ni sukcesos kontribui al la plenumo de la Granda Revo. Kiam mi parolas pri la "altaj spiritoj", mi supozas, ke en ĉiu homo povas "dormi" alta spirito, nur ke ni devas vekti lin kaj igi lin labori por ni. Do se ni ne volas aŭskulti aliajn spiritojn, aŭskultu la propran konscion, kaj ni ekkonos la vojon sur kiu ni devas iri.

Ĉar la programo de UK estas vasta, mi ne povas ĉi-tie detaligi ĝin, mi nur tuŝas la gravecon de ĉi-tiu granda monda evento. Ĝi estas

grava ne nur por esperantistoj, sed ankaŭ por la neesperantista mondo, ĉar la rolo de UEA estas delonge rekonita de la plej altaj teraj instancoj: la mesaĝoj de la ĝeneralaj sekretarioj de la UNO kaj UNESCO substrekis tion ankoraŭfoje, okaze de la malferma festo de la UK en Montpeliero.

Rimarkinde estas ankaŭ la fakto, ke la UK estis anoncita per kvalitaj antaŭkongresaj agoj kaj daŭrigata per la postkongresaj eventoj, kiel estus la ILEI konferenco. La naciaj kongresoj kaj ĉiuj aliaj esperantistaj renkontiĝoj okazantaj en la tuta mondo dum la tuta jaro ĝis la nova UK, estas nur ĉeloj de la sama organismo kaj ĉiuj laboras por la sama celo, por krei pontojn inter kulturo kaj inter popoloj, kaj tiel konstrui kune la PACON sur ĉi-tiu militema planedo. Ĝuste el tio konsistas la forto kaj la sukceso de nia movado.

Preskaŭ ĉiu partopreninto de la 83-a UK de Esperanto reiris hejmen kun la arda deziro renkontiĝi denove post unu aŭ du jaroj en alia lando, en alia urbo, sed kun la samaj altaj celoj. Sed ili riĉigis la animojn kaj la cerbojn per novaj sentoj kaj ideoj, kaj la kongresa etoso donis al ili novan fortan kuraĝon je daŭra agado, tiel ke la efiko de UK esprimos ĉie sur la tero dum la tuta sekvonta jaro. Ĉar mi sentas tiel kaj mi estas esperantisto, tute certe preskaŭ ĉiuj esperantistoj sentas same.

Mihai TRIFOI. BICSAD

Aperis la libro DRAKULA de Ioan SĂRBU. Krom la konciza biografio de Drakula, ĝi enhavas ankoraŭ dek novelojn tradukitajn el la rumanlingva literaturo.

Ĝi mendeblas ĉe Ioan SĂRBU, b-dul 15 Noiembrie 92, sc.C, ap.8, RO-2200 BRASOV, RUMANIO.

INAŬGURO DE LA 83-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Venis salutmesaĝoj de eminentuloj, kiel la Ĝenerala Sekretario kaj la Direktoro UNESCO, la Prezidanto de la Federacio de Instruistoj de Modernaj Lingvoj, ktp.

Renato CORSETTI enkondukis la kongresan temon, indikante i.a., ke "inter la nepraj celoj de Esperanto estas ĝia rolo de ponto inter la sudo kaj la nordo", kaj ke "ni estas ĉe la komenco de movado en afrikaj landoj kaj islamaj landoj".

Michela LIPPARI prezentis la ses novajn honorajn membrojn de UEA: André ALBAULT kaj Pierre BABIN (FR), Ignat BOCIORT (RO), Claude PIRON (CH), William R. HARMON (US), kaj Sabura YAMAZOE (JP).

Dum sia parolado, Lee CHONG-YEONG, Prezindanto de UEA, aludis pri la 90 jaroj de UEA kaj pri la 100-jariĝo de Unuiĝo Franca por Esperanto. "La mondo sentas bezonon de komuna lingvo...". Li emfazis kelkajn gravajn laborplanojn de UEA:

- Kampanjo 2000 aprobita dum la pasintjara UK
- Fortigo de rilatoj inter UEA kaj UN
- Linguapax
- Kiel savi valorajn esperantajn
- Forumo de Esperanto-Komunumo

Salutis nome de SAT Yves PEYRAUT, kiu i.a. diris "estas nova etapo por ke ni kune antaŭen iru". Sekvis salutoj de landaj asocioj.

La muzikajn paŭzojn faris Isabelle FRANÇOIS kaj Alexandre AUGER de la okcitana grupo Mescladissa.

Ni gratulas al prof. Ignat BOCIORT, okaze de sia elektiĝo inter la honoraj membroj de UEA!

La red.

Mesaĝo de la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj

Estas por mi granda plezuro sendi bondezirojn al la membroj de UEA en la momento kiam vi kunvenas en Montpellier por via 83-a Kongreso.

Gesinjoroj, la nuna estas jubilea jaro. En tiu-ĉi jaro de la kvindekjariĝo de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, ĉie en la mondo viroj kaj virinoj de ĉiuj haŭtkoloroj kaj de ĉiuj religioj kuniĝas por propriigi al si niajn komunajn homajn rajtojn. Ili tion faras sciante ke la homaj rajtoj estas universalaj kaj nedisigeblaj, kaj ke la lingvo de la homaj rajtoj estas komuna lingvo de ĉiuj popoloj. Ĝi estas verdire universala lingvo kiu fremdas al neniu kulturo kaj propras al ĉiuj nacioj. Ĝi estas lingvo kiu asertas la rajton je evoluo je vivo kaj libereco, je malsamaj opinioj kaj diverseco. Ĝi estas en la kerno de ĉio kion UN aspiras atingi en paco kaj evoluemo.

Kiam vi kunvenos en Montpéllier por esplori la pontojn inter kulturoj, mi scias ke vi emfazos la rolon de toleremo kiel konstruelemento de ĉiuj pontoj, la bazo de ĉiuj homaj rajtoj, ĉiaj paco kaj progreso, kaj la fakton ke lingvon oni devas uzi por superi diferencojn, ke konstrua komunikado kreas pontojn, dum lingvo uzata kiel armilo nur apartigas.

Mi dankas al UEA pro ĝia laboro por antaŭenigi lingvon kiel ilon por unuigi anstataŭ disigi kaj pro via celebrado de la kvindekjariĝo de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. Tiu-ĉi konferenco povos valore kontribui al tiu procezo, per fortigo de ligoj kaj intersanĝoj de informoj kaj ideoj.

Mi deziras al vi agrablan kaj profitodonan semajnon en Montpéllier.

Koffi ANNAN

KORESPONDI DEZIRAS

Mi dezirus korespondi kun Esperantist(in)o el Rumanio. Mi loĝas en urbeto situata en la Norda parto de Francio.

Arnoc BAYARD, 53 Boulevard Lepoivre,
F-62710 COURRIERES, FRANCIO

Se vi deziras korespondi esperante, trovi geamikojn tra la mondo, skribu al:

KORESPONDA SERVO MONDSKALA
B.P.6, F-55000 Longeville-en-Barrois, Francio

Mesaĝo de la eks-Ĝenerala Sekretario de UN kaj ĝenerala sekretario de Internacia Organizaĵo de Francilingvio

Sinjoro Prezidanto, gesinjoroj,

Estas por mi granda plezuro povi saluti vin okaze de la 83-a kongreso de UEA. Tio havas plurajn kialojn. La unua estas ke la temo pri kiu vi elektis okupiĝi dum la tuta semajno, "Mediteraneo, ponto inter kulturoj", estas por mi temo kara el pluraj vidpunktoj.

El persona vidpunkto, evidente, sed ankaŭ kiel respondeculo dum multaj jaroj de la egipta diplomataro. Mi ankaŭ havis plurfoje la okazon renkontiĝi kun mediteraneaj demandoj dum miaj kvin jaroj ĉe la kapo de la Organizo de UN.

Ankoraŭ nun, en miaj novaj funkcioj kiel Ĝenerala Sekretario de la Internacia Organaizajo de Francilingvio, la mediteranea areo estas denove en la kerno de miaj okupiĝoj. Tio montras, kiom min koncernas la diskutoj kiujn vi okazigos dum tiu grava aranĝo.

Cetere estas por mi grave omaĝi la batalon kiun daŭrigas via Asocio jam dum 90jaroj.

Batalo sub la signo de amikeco kaj solidareco inter la popoloj, sub la signo de respekto al kultura diverseco.

En momento kiam tutmondiĝas la komerco, kiam konturiĝas la minaco de lingva monotoniĝo kaj malapero de kulturaj valoroj, ni ja devas mobilizi nin por ke la monda komunumo al kiu celas la leĝoj de la merkato ne estigu tutmondan kulturon kun unueciĝo de la modeloj, la kondutmanieroj, kaj la pensoj. Temas pri la demokratigo, je monda nivelo, de la rilatoj inter la popoloj!

Por fini, mi volas diri al vi ke en la vorto mem "Esperanto" troviĝas komuna espero. Espero pri solidareco kaj toleremo, espero pri komprenemo kaj respekto al aliuloj. Troviĝas ankaŭ certeco - certeco pri la unueco de nia destino kaj pri la fakto ke ni ĉiuj apartenas al unusola homa komunumo.

Tiujn valorojn mi dividas kun vi.

Kaj tial mi deziras al via kongreso plej bonan sukceson.

Boutros BOUTROS-GHALI

NOVAĴOJ

Pruntlibraro de BAZARO

BAZARO havas libraron. Ĉiuj geesperantistoj el Rumanio havas eblecon prunti el la libroj SENPAGE! La petitan libron ni sendos per rembursio. Ni petas maksimume dum tri monatoj ellegi la pruntitan libron. Pro la perdita libro oni devas pagi 20.000 leojn.

Al la interesigantoj ni sendas la liston de la titoloj.

La red.

Inter 4-6 de septembro en Miercurea Ciuc titolita **Internacia E. Kultur-Turismo** okazis nova E-aranĝo, havante la temon Amikeco, junularo, kulturo, turismo, afero, paco. Ekde la nuna jaro oni organizos ĝin ĉiujare! Por interesigantoj, la adreso de la organizanto estas:

s-ino JOZSI Jolanda, str. Patinoarului nr.12/A/3,
RO-4100 MIERCUREA-CIUC, Tel.:+40-66-116129

Pro teknikaj problemoj la unua **TV-elsendo en Esperanto** per satelito okazos la 15-an de decembro 1998.

Konkurso pri satiroj

Se vi aĝas malpli ol 30jarojn kaj ŝatas gajni, verku ironian rakonton pri temo libere elektita - sed interesa por la junularo aŭ socie aktuala -, eventuale kun rilato al Esperanto kaj ĝia movado, kaj partoprenu per via originale Esperantlingva teksto en la konkurso de TEJO pri satiroj. Via verko devas ampleksi inter 4 kaj 8 paĝojn A4. La unua, dua kaj tia premiitoj ĉiu ricevos *Plena Ilustrita Vortaro* kaj la diskon *Vinilkosmo-kompil'* (1 aŭ 2), la unua kaj la dua krome 300 resp. 150 germanajn markojn, plus la ĉampiono estos abonigita al *Rok-gazet'*. Pluaj diskoj kaj kasedoj por la 4-a - 7-a lokitoj!

Enfermu vian verkon en koverton, metu ĉi-tiun - kune kun papero malkaŝanta vian identecon - en alian koverton kaj sendu ĉion, antaŭ la 30-a de oktobro, al TEJO (ĉe la CO de UEA), al suba adreso:

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM,
NEDERLANDO

Indiku sur la koverto "Por la Satiro-konkurso".

En Timisoara, inter 18-20 de septembro okazis la **3-a Nacia Kongreso de RumEJA**, kune kun la Balkanlanda Junulara Konferenco (BAJK).

Ĉeforganizanto: Mirela FRANTESCU, aleea Creatiei nr.9, ap.18

RO-1900 TIMISOARA, Tel.: +40-56-144102

De la organizantoj aŭ de la partoprenantoj ni atendas raporton pri ĝi!

EKSPOZICIO

"Decembraj festoj en nia familio". Tehniko de desegnaĵoj libere elektebla. Plej taŭga formato: 21x29,5cm. Limdato: 1-an de novembro 1998. Al la desegnaĵo aldonu: nomon, adreson, ajon kaj unufrazan priskribon de la verko.

RAJTAS PARTOPRENI ANKAŬ NEESPERANTISTOJ!

Kontaktadreso: Marija BELOŠEVIC,
Sveti Duh 130, HR-10000,
ZAGREB, KROATIO

La hungarlingva literatura revuo **HELIKON** aperanta en CLUJ-NAPOCA, RUMANIO, aperigis la hungarlingvan tradukon de poemoj verkitaj de kelkaj rumaniaj slovakaj poetoj. La poemojn tradukis s-ino 'SIGMOND Júlia el Esperanto. La poemoj de Ondrej STEFANKO

titolitaj "Post ĉevaloj infano" kaj "Malkovrita realeco", de Anna Karolina DOVÁL'OVÁ titolita "Mateniĝo", de Ivan Mirislav AMBRUS titolita "La senfoliaj homoj", de Jaromir NOVÁK titolita "Kiu eĉ plori" kaj de Adam SUCHANSKY titolita "Pritaksi la distancon" aperis en la dulingva (slovaka-Esperanta) volumo "Eĥo de niaj krioj" en la traduko de s-ino Anna RAU-LEHOTSKÁ el NADLAC.

La IV-a Rumania Kongreso de Esperanto

En la komenco de majo ĉi-jare la Rumania esperantistaro kongresis en Timisoara. Partoprenis ĉ. 50 da personoj, kiuj reprezentis la filiojn de Bukareŝto, Baia-Mare, Braŝovo, Oradea, Miercurea-Ciuc, Craiova kaj de aliaj urboj. La unuan tagon la estraro de la asocio kaj de la filioj prezentis raportojn pri la E-agado kaj la finanĉan staton de EAR (Esperanto-Asocio de Rumanio), ni elektis la novan estraron kaj pridiskutis la programon por la venonta periodo. Ni ĉiuj konsentis, ke ni devas kunveni pli ofte. Tiel ni decidis, ke ni renkontiĝos denove aŭtune, eble en septembro, en Braŝovo. La duan tagon okazis Simpozio pri Esperanto. Prelegis esperantistoj de la tuta lando kaj ni intencas eldoni broŝuron enhavantan la resumojn de la prelegoj. Krome ni volas aperi en esperanta faka eldonaĵo la prelegon "Esperanto kaj matematiko" (prof. Ignatiu ORHA), ege interesa, kiu proponas matematikan modelon por la lingvo Esperanto.

Dum la kongreso estis elektita la nova estraro de EAR:

prezidanto	-mat. Aurora BUTE, Timisoara
unua vicprezidanto	-ing. Dorin HEHN, Timisoara
vicprezidanto	-ek. Marian CONSTANTINESCU, Bukareŝto
vicprezidanto	-prof. Emil CRÂNCAU, Baia-Mare
ĝenerala sekretario	-prof. Florica POPA, Timisoara

S-ro Marian VOCHIN organizis ekspozicion de rumaniaj esperantajoj, aperigitaj dum jardekoj.

Tuj post la kongreso, niaj samurbaninoj Maria SECULA kaj Olimpia GUIU partoprenis la Tagon de Eŭropo, okaze de kiu niaj etaj esperantistoj belege kaj ĉarme kantis esperante.

Ni deponis en la Juĝejon la dokumentojn rilate al la nova estraro, kaj nun ni "batalas" (ne kontraŭ sed kun) la fisko akiri la kodon por nia asocio.

La nova estraro proponas al si, post silenta tempo, revigligi la E-movadon, kunveni pli ofte en diversaj E-centroj, organizi almenaŭ

jare seminariojn kaj simpoziojn pri Esperanto. Restas la problemo, pro la manko de rimedoj sen rapida solvo, la aperigo de revuo. Tial la estraro enregistrigis EAR en la Katalogon de Neregistaraj Organizadoj kaj iniciatis tri programojn (KURSO, VORTARO, EKLIPSO) kiujn ni esperas ke la Eŭropa unuiĝo subvencios.

Okaze de la Suneklipso en 1999, en Timisoara ni deziras organizi, grandan internacian E-aranĝon, por ke interesitaj esperantistoj el la tuta mondo kapablu "rigardi" la fenomenon. La fakuloj asertas, ke la eklipson oni povos vidi plej bone kaj ĝi estos plej longdaŭra en Rumanio. Ni ne volas preterlasi tiun grandan okazon por kunveni Esperante en Timisoara, la urbo tutmonde konata ekde 1989. Samtempe ni zorgas pri la kotizo de nia membraro kaj monsubtenoj de landaj kaj lokaj firmaoj. Ni petas kaj instigas la membrojn de EAR kaj ĉiujn kiuj havas okazon, kontakti homojn kiuj subvencios nian asocion. Diru ke Esperanto estas ideo kaj rimedo por paco, amikeco, internacia interkompreniĝo kaj kunlaborado, ke esperantistoj ne politikas kaj... monon ne havas. La nova estraro proponas al si ankaŭ esti malfermita al novaj ideoj, proponoj kaj precipe agadi travideble kaj demokratie. Se vi havas proponon aŭ kritikon kiu povus antaŭenirigi nian E-agadon, kiu povus helpi nin, ne hezitu skribi al ni.

La sekvontan cirkuleron ni dissendos aŭtune, ĝis tiam ni atendas viajn opiniojn, proponojn, kotizojn (15.000 leojn jare sendu en la konton numero 2511.010309.95 CEC Timisoara). Ne forgesu, ke la kotizantoj ricevis subvencion okaze de la ĉi-jara Tutlanda Kongreso, kaj ni nepre bezonas monon por aperigi E-revuon.

prof. Florica POPA,
ĝenerala sekretario

mat. Aurora BUTE,
prezidanto

ŜERCOJ

Riporto

La ĵurnalisto faras riporton en malliberejo. Li demandas iun malliberulon:

-Ĉu vi ŝatus se finiĝus via puno?

-Ne!

-Kial? Ĉu tiel bone vi fartas ĉi tie?

-Ĉi tiun mi ne povus diri, sed mi ricevis ĝismortan punon...

Ĉe svatagentejo

-Tie ĉi estas virino , kiun mi proponas kiel edzino por vi.

-Sed tiu ĉi virino estas maljuna, malbela kaj unuokula.

-Vi ne devas flustri, ĉar ŝi estas ankaŭ surda...

Ĉe restoracio

-Kelnero! Mi trovis muŝon en mia supo!

-Pardonu al mi, sinjoro. Mi kredis ke mi elprenis ĉiujn muŝojn el ĝi...

Ne gravas

-Karulino, mi devas konfesi al vi, ke mi ne povas kuiru - diras la edzino post la geedzeco.

-Ne gravas, karulino. - respondas la edzo - Ĉar ankaŭ mi devas nun konfesi, ke mi ne gajnas tiom da mono, ke vi havu kion kuiru...

La ŝercojn sendis, SIMON László

LA BATALO DE RAZBOIENI - VALEA ALBA

Oni diras, ke la GRANDA kaj SANKTA STEFANO, reĝo de Moldavio, estis venkita de turkoj en la loko nomita VALEA ALBA (BLANKA VALO). Ĉar la kapo ne plu helpis lin kion fari por protekti la landon kontraŭ de tiuj ĉi paganoj, li iris al ermito por peti konsilon.

-Kie estas la turkoj? - demandis la Ermito.

-En iu valo ĉirkaŭita de montetoj - estis la respondo.

-Arigu rapide mil ŝafojn, mil ŝafidojn, alian milon da bovinoj kaj alian da bovidoj. Poste aranĝu ĉiun grupon sur iu monteto, sed tiel, ke la ŝafoj troviĝu vid-al-vid de ŝafidoj, kaj la bovinoj vid-al-vid de la bovidoj. Aldonu al ĉiu grupo de bestoj malgrandan kolektivon da batalantoj. Kiam ĉio estas preta, vi surgrimpu la plej altan monteton kaj ordonu ke oni ekludu je trompeto kaj ekpafu per la kanonoj, pli poste vi agu kiel Dio helpos vin.

Stefano agis laŭ la konsilo de la Ermito, kaj kiam la trompetoj eksonis kaj la kanonoj ektondris, la bestoj komencis bleki kaj muĝi kaj kuri, la ŝafidoj al ŝafoj, la bovidoj al bovinoj. Ŝajne en la mondo estis la fino de la vivo.

La turkoj vidante tion forte timiĝis, ne sciante kien iri kaj kion fari. Sed kiam ili vidis la alproksimiĝantajn grupojn de batalantojn, ili terure konfuziĝis kredante, ke ĉiuj homoj-bestoj estas armeo de Stefano.

La turkoj teruritaj, provis savi sin kurante, sed Ŝtefano, kune kun siaj batalantoj, kiel tondro, jetis sin sur turkoj, brave batante ilin ĝis la turkoj, kiuj restis vivaj, provis eskapi trans la Danubo.

Tiel la reĝo Ŝtefano ankaŭ ĉi-foje estis venkinto.

Laŭ la rumanaj popol-legendoj
de Eugenia-Ecaterina POPOVICIU, ORADEA

RECEPTOJ

USONA BANANKUKO

Jen facila recepto por kuko tre ŝatata de usonanoj. Fakte, ili ne nomas ĝin kuko, sed "varma pano". Kiel ajn vi decidis nomi ĝin, ni deziras al vi BONAN APETITON!

En bovlo miksu: 3 plenmaturajn bananon, bone pestitajn per forko, 2 ovojn kirlitajn ĝis leĝereco. Kribru miksante 2 tasojn da tritika faruno, 1/2 aŭ 3/4-an tason da sukero, 1 kuleron da natria bikarbonato, 1 kulerego da salo.

Aldonu la sekan miksaĵon al la malseka, kaj bone miksu, aldonante 1/2 tason da tranĉitaj juglandoj.

Elverŝinte ĉion en buterumita bakoplaton baku 1 horon.

laŭ revuo MONATO

VIENA KUKO

1) Ingrediencoj: 210gr. da faruno, 80gr. da graso, 70gr. da polvosukero, 1 ovoflavo, iom da amoniako.

Miksu, knedu ĉion ĝis iĝos pasto. Etendu la paston, metu en la bakpladon, ŝmiru ĝin per maldika tavolo da marmelado, kaj aldonu la sekvantajn preparajojn:

2) Ingrediencoj: 5 ovoflavoj, 250gr. da sukero, muelitaj nuksoj, 6 ŝaŭmitaj ovoblankoj. Ĉion intermiksu, sternu sur la marmelado kaj baku ĝin. Sekvas la glazuro:

3) Ingrediencoj: 150gr. da sukero, 1/2dl. da akvo, el kio preparu siropon. Aldonu kuleron da kakao, kuleron da rumo, kuleron da butero kaj la varman preparajon (glazuro) sternu sur la bakajon. Oni povas ornami ĝin per kokoso-raspitaĵo aŭ per multkoloraj sukerglobetoj.

Eugenia-Ecaterina POPOVICIU, ORADEA

ARANĜOJ

84-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

31 julio - 7 aŭgusto 1999, BERLINO, GERMANIO

La aliĝkotizoj por Rumanianoj estas la jenaj:

Aliĝkategorio	ĝis 30.30.98	ĝis 31.12.98	ĝis 31.03.99	poste
ne individua membro de UEA	225 NLG	280 NLG	335 NLG	390 NLG
individua membro de UEA	180 NLG	225 NLG	270 NLG	315 NLG
kunulo/junulo/ handikapulo, ne individua membro de UEA	135 NLG	170 NLG	200 NLG	235 NLG
kunulo/junulo/ handikapulo, individua membro de UEA	90 NLG	112 NLG	135 NLG	155 NLG

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.

Senpage aliĝas: -infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 31.12.1978;
-nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

Aliĝu al: UEA, Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, NEDERLANDO.

BUDAPEŝTA SILVESTRO

29 decembro 1998 - 2 januaro 1999, BUDAPEŝTO, HUNGARIO

Partoprenkotizo: -160USD en hoteloj kun dulitaj ĉambroj kun duonpensiono

-110USD en turisma kategorio (3-4 litaj ĉambroj)

Aliĝu al: Vojaĝoficejo Espertur

H-1061 BUDAPEST, Andrásy út 27, HUNGARIO

Tel.: +36-1-2680306; Faksilo: +36-1-2680331

Hejmpaĝo: www.c3.hu/~esperantohea;

Retadreso: esperantohea@mail.c3.hu

LA KAT-LINGVO PAROLATA

Belaspekta (176 paĝoj, 25cm, 17.50€), la libro de *Alexandra Seller* "*Spoken Cat and Relevant Factors in Worldview*" aperis en la angla ĉe *Bellow Publishing - London*, en 1997. La titolo de la libro esperantista estas la "La Kat-Lingvo Parolata kaj Rilataj Faktoroj pri Mondvido". La rilatajn faktorojn pri mondvido, oni povas ankaŭ legi kiel fabelan vidaĵon. Kaj la aŭtorino dediĉas la plej grandan parton de la verko al la gramatiko de la kat-lingvo, kun ekzemploj, leksikono, ekzercoj por la lernanto, ktp.

"...en la tempo, kiam bestoj paroladis..."

Ĉiuj scias ke bestoj inter si komunikiĝas kaj sin komprenas, sed al homoj kompreni tiujn esprim-manierojn estas nuntempe malfacile. Oni diras "...en la tempo, kiam bestoj paroladis...", sed ankaŭ nuntempe bestoj parolas; estas ni, kiuj ne plu komprenas ilin, ĉar ni tute perdis kontakton kun la mondo de la bestoj, kaj niaj sensoj ne plu kapablas ricevi la plej-parton de la sciigoj pri tiuj elementoj de la medio, kun kiuj en la pratempo de nia surtera vivado ni estis en natura kontakto.

La Alfabeto

Tute nova alfabeto de la nazala tono-lingvo de la kato ekzistas por uzo de la kleruloj, sed por tiuj, kiuj deziras mem-lerni la lingvon, la aŭtorino uzis latinajn literojn. La alfabeto latin-litere transskribita de *Alexandra Seller*, kiun ni ĉi-tie esperantigas, estas la jena:

a, aa, â, aŭ, b, e, f, h, ĥ, i, ii, ju, m, n, o, oŭ, p, r, rr, R, RR, t.

-La signoj inter la literoj: ^ indikas glotan spiron, ` glotan halton, ´ mallaŭtan aŭ spiran glotan halton.

-â kun supersigno estas parolata tra preskaŭ fermita buŝo.

-La vokaloj, kiuj sekvas r kaj rr estas tre nazala.

-ĥ post oŭ ricevas duoblan forton, kiel ekzemple **merouĥĥap**, kiu signifas "malsati".

-m, n, p, t, kiam en la fino de la vorto, ili neniam eksplodas; la sono haltas, kiam la lipoj iĝas kune kaj ĝi estas englutata.

Kelkaj Kat-vortoj

aŭa	hundo	mi'ao	ĝardeno
birr	lakto	mut	askultu
irr	bongusta	pŭah	malseka
maŭrou	pordo	rir	muziko
merah	domo	ŭah	belaspekta

rrup estas kares-invito, kiam la kato diras unu aŭ plurfoje arkigante la dorson aŭ premante la kapon kontraŭ parto de la homa korpo

maŭ signifas kat-ĉesto, kaj tiu vorto estas uzata por indiki la pronomojn - mi, ni, - kiam katoj parolas al katoj, kaj signifas - vi - , kiam kato estas alparolata

ma` signifas iu ĉesto, kiu ne estas kato

Muzik-amantoj

Ŝajnas ke homoj nuntempe ne kapablas kapti la tutan ampleksan gamon de la sonaro, kaj ke la Pitagora gamo estas nur "proksimumo" de ĝi. Katoj ŝatas aŭskulti muzikon, kaj precipe fajfadon kaj violon-ludadon precipe je altaj notoj. La ĉeĥa dramisto *Karel Čapek* rimarkis ke katoj karese ekscitiĝas kiam ekzemple li fajfadas al si mem mallaŭte je alta noto la Barkarolon de Ofenbaho (*Offenbach*) el la Rakontoj de Hofmano (*Hoffmann*). Li tion eksperimentis kun germanaj, italaj kaj britaj katoj; ne estas geografia diferenco inter ili; se katoj aŭdas onin fajfi altatone, ĉiuj reagas sammaniere.

La Proverbo de la Kato

"Gramatik-sendisdisciplino estas la radiko de ĉiu malbono", laŭ *Alexandra Sellen*, estas kat-proverbo. Ni ne scias ĉu kelkaj legantoj de la kat-gramatiko de *Alexandra Sellen* lernas disciplinon la lingvon tiel bone ke li aŭ ŝi kapablos komuniki per tio kun katoj, sed ĉu la saĝa sugesto de la supre menciita proverbo ne povus helpi nin "disciplinigi" ankaŭ nian lingvon? Eble ni ricevos ian bonon.

laŭ la revuo INTERNACIA VEGETARANISTO

KONGRESA REZOLUCIO**La 83-a Universala Kongreso de Esperanto,**

kunvenanta en Montpeliero, Francujo, de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1998, kun 3133 partoprenantoj el 66 landoj,

salutante la 50-an datrevenon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kies respekto estis kaj restas esenca kondiĉo de la laboro por Esperanto,

debatinte pri la nuntempaj ideoj kaj laboroj de interregistaraj kaj neregistaraj organizajoj rilate edukadon al paco kaj al reciproka toleremo, kun aparta atento al mediteraneaj landoj,

analizinte la kontribuon de la Esperanto-komunumo, realan kaj potencialan, al tolerema, multkultura mondo,

alvokas

al Unuiĝintaj Nacioj, al ties instancoj, kaj al neregistaraj organizajoj, ke ili donu pli grandan atenton kaj serĉu eblan solvon al la problemo de la lingva dimensio de homaj rajtoj. Tiu dimensio estas tro ofte preteratentata, kaj tiel la homa rajto plene kaj sendiskriminacie kompreni kaj esti komprenata je internacia nivelo ne povas realiĝi,

al UNESCO ke, kadre de sia LINGUAPAX-programo, ĝi konsideru instruadon de Esperanto por eksperimenti ĝian valoron en la antaŭenigo de interkultura edukado,

al la landaj kaj fakaj organizajoj de la Esperanto-komunumo, ke ili intensigu en ĉi-tiu spirito kaj en la kadro de Kampanjo 2000 siajn klopodojn por meti la internacian lingvon Esperanto kaj ĝiajn valorojn je la servo de la evoluo de la nuna mondo en paco kaj toleremo.

PRI MIA E-AGADO

Post kiam mi aktiviĝis en mia lernejo en la vilaĝeto Brodina de Sus, E-rondeton da lernantoj, en la periodo 1998-1990 kaj 1993-1995, enkadre de la Kastora Klubo kaj la Infanoj ĉirkaŭ la mondo, redaktis kune kun miaj varbitoj M. C. GHILEA kaj Gh. SALAHURA en la

periodo 1990-1998 por "Monato", kaj nur mi por "Kontakto" kaj "ASISTILO", aliĝis en la jaroj 1990-1994 al naŭ E-fakaj asocioj eksterlandaj, aktivis laŭvice kiel fakdelegito, E-instruisto kaj gvidanto, tradukisto kun la intenco "mordi" ĉion ajn en Esperantujo, post kiam mi korespondis kun 60 esperantistoj el 23 landoj, verkinte ĉirkaŭ sepcentoj da leteroj kaj ricevinte samegale, ĉi-jare mi festas dek jarojn de esperantista aktivado, kaj daŭre mi limiĝos je la redaktado kaj rilatado al la esperantistoj kaj al la E-etoso, en mia unua romaneto aperinta en junio ĉi-jare, mi jam aludas al Esperanto, sed en la dua verkenda ĝis la jarfino mi rilatos plue al la esperantistoj, revuoj, ktp.

Nicolae MACOVEI, BRODINA DE SUS

OPINIOJ, KONSEILOJ, KRITIKOJ, PROPONAJ

Bonvolu diri al mi, kiam estas la redaktofino de BAZARO.

Cristian MOCANU, DEVA

La redaktofino estas: la 15-a de februaro, la 15-a de majo, la 30-a de aŭgusto kaj la 30-a de novembro.

La red.

La presajo BAZARO estas nepraĵo, kaj spite al la "ĝeno", kiun igas ĝi al la aktivuloj el Bukareŝto kaj Timisoara, ĝi devas ekzisti. Ĝi havos mian apogon kaj ankaŭ de miaj kunlaborantoj.

Nicolae MACOVEI, BRODINA DE SUS

En la zorgo de Eldonejo DOKIA aperis du libroj:

Alti pasi în Esperanto de Ionel ONET, 68 paĝa, formato A5, kiu enhavas Rumana - Esperanto vortaron, E-gramatikon, Rumanajn toponimojn en Esperanto kaj Rumanan Esperantistan Bibliografion. Prezo: 8000 leoj+sendokostoj.

Documente Esperanto de Ionel ONET kaj Sasha VLAD, en rumana lingvo, 38 paĝa formata A5, antologio dediĉita al 110 jariĝo de lingvo Esperanto kaj al la 80-a datreveno de la morto de Zamenhof. Prezo 4000 leoj+sendokostoj.

Ambaŭ libroj estas mendeblaj per remburso ĉe *Radu CRETU*
str. Padin 28/19, RO-3400, CLUJ-NAPOCA, RUMANIO

ALVOKO!

Fondiĝos organizajo - post nelonga tempo - kun nomo "Astrologia Esperantista Societo". Mi serĉas kontaktojn kun tiuj, kiuj okupiĝas pri astrologio, aŭ interesiĝas pri la temo, kaj tial volonte partoprenus en la laboro de la nova societo. Horoskopo-pretigado.

Mi petas la legantojn, se ili konas astrologojn esperantistojn, bonvola informi ŝin/lin pri nia alvoko.

D-ro NAGY Robert, profesoro pri astrologio
H-1081 BUDAPEST, Köztársaság tér 16. V.em. 16., HUNGARIO
Retpoŝto: AstroEsp@dpg.hu

LA 9-a RUMANIA FERVOJISTA ESPERANTISTA KONGRESO

Inter 21-23. aŭgusto 1998 okazis en Sibiu la 9-a Rumania Fervoĵista Esperantista Kongreso kun la partopreno de s-ro Joachim GIESSNER, honora prezidanto de IFEF, s-ro Mihai STEFAN, prezidanto de AFER kaj reprezentanto de UAIFR, s-ro Virgil LEANCU, reperezentanto de la estraro de UAIFR, s-ro Marian CONSTANTINESCU, vicprezidanto de Rumana Esperanto-Asocio kaj ĉirkaŭ 110 membroj de 15 filioj. Tio okazis sub la aŭspicio de Urbodomo de Sibiu, oficialaj organoj de distrikto Sibiu kaj de Ministerio pri Transporto.

Dum la kongreso okazis elekto de nova estraro kaj validado de la nova statuto de AFER. S-ro J. GIESSNER donis telekurson por helpi la ĉirkaŭ mil membrojn de AFER lerni pli facile Esperanton.

La programo estis diversa kaj la organizado tre bona. Ĝi enhavis interkonan vesperon kun festiva vespermanĝo, vizito al vilaĝa muzeo kaj ekskurso al Păltinis. Kadre de la oficiala vizito al Urbodomo, s-ro Virgil LEANCU prezentis la nunan situacion kaj venontajn projektojn.

Iuliana TRIFAN, SIBIU

ABONEBLECO

Por la jaro 1999 estas ebleco aboni je HEROLDO DE ESPERANTO kaj LITERATURA FOIRO.

Heroldo de Esperanto (16 numeroj) 120.000 leoj

Literatura Foiro (6 numeroj) 104.000 leoj

Interesiĝantoj bonvolu sendi la monon kiel eble plej frue al la perantino: 'SIGMOND Júlia, 3400 CLUJ-NAPOCA C.P.200.

ASOCIO de ESPERANTO
C.P. 1111
RO-3400 CLUJ-NAPOCA
RUMANIO

IMPRIMATE



al
PAPF TIBOR
TROMBITAS u. 12.
H-4031 DEBRECEN